

# STARO

**N-ro 4/2011 (241)**

**ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO**



*foto: Libuše Dvořáková*

Kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio  
Šumperk 7-9 oktobro 2011  
Vizito de la urba teatro

## ☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,  
aperas 4-foje jare.

**Asocia adreso:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto:** cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.

**Retpaĝaro de ĈEA:** www.esperanto.cz

**Identec-numero (IĈ):** 00 44 30 34

**Starto retpoŝte:** starto@esperanto.cz

**Komercaj anoncoj:** 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

**Membrokotizoj:** A 300 Kč, B 200 Kč, C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

**Korespondaj kursoj:** Cink: 400 Kč / 720 Kč (rete / normale); Marĉek: 600 / 800 Kč; Cink por progresintoj 600 / 1080 Kč. Aliĝoj: Jana Melichárková, Polní 938, 696 02 Ratiškovice, melicharkova8@seznam.cz

**Libroservo:** p/a Anna a Jiří Vyšinkovi, Kollárova 131, 696 42 Vracov, tel. 518 628 155, anjivy@seznam.cz

**Sekcioj de ĈEA:** katolika, kristana, blindula, pri informadiko (memstariĝis: AEH, junulara, fervojista)

**Komisionoj de ĈEA:** pedagogia

**Muzeo:** muzeagrupo@esperanto.cz

**Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj:** Jarmila Čejková, Malý Koloredov 1538, 738 01 Frýdek-Místek, jarkacejkova@centrum.cz

**BANKO-KONTO de ĈEA:**

2800 186 228/2010

**Fio banka Svitavy**

## Komitato de ĈEA:

**Prezidanto: Vladimír Dvořák,** Gregorova 2563, 397 01 Písek, vl.dv@centrum.cz, 774 999 091 (gvidado, kunordigado kaj reprezentado de ĈEA, eksteraj rilatoj krom UEA, EEU)

**Vicprezidantino (komitatano A de UEA):** Libuše Hýblová, Bohutín 136, 789 62 Olšany, tel. 774 928 974, libusehyblova@seznam.cz (UEA, EEU, membroj, sekcioj, kluboj, konferencoj, protokolado)

**Vicprezidantino:** Libuše Dvořáková, Zahradní 2/B, 568 02 Svitavy, tel. 461 532 257, dvor.libuse@seznam.cz (Muzeo de Svitavy, rilatoj al urbo Svitavy, muzea kaj ekspozicia grupo)

**Kasisto:** Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, 517 332 339, vhirsx@email.cz (membrodatumbazo, kontado)

**Komitatanino:** Pavla Dvořáková, Gregorova 2563, 397 01 Písek, tel. 774 942 424, pavla.esperanto@gmail.com (informado, retaj projektoj, ekspozicioj, subvencioj)

**Komitatano kaj redaktoro de Starto:** Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 530 319 263, malovec@volny.cz (historio de la movado, kulturo, lingvaj konsultoj, ciferecigado, fakaj aplikoj, pedagogio)

**Komitatano:** Miroslav Hruška, Haškova 2, 638 00 Brno, miropiro2312@gmail.com (junularo, komputila klerigado, teknika subteno, redaktado)

**Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio kaj UK-peranto:** Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 201, chrdle@kava-pech.cz

**Revizia komisiono de ĈEA:**

**Prezidanto:** Jan Řepa (Fidel), Na Valše 250, 38411 Netolice, fidel@razdva.cz

Věra Gavandová, Komenského 657, 789 61 Bludov, vgavandova@email.cz

Ludmila Srbová, Prodloužená 264, 530 09 Pardubice, ludmila.srbova@seznam.cz

**Esperanto-Muzeo en Svitavy:** Ottendorfer domo, Máchova alej 1, 568 02 Svitavy, direktorino: Blanka Cuhelová, tel. 461 532 704, cuhelova@muzeum.svitavy.cz.

**Kontrollegis:** Sabine Hauge, la komitato.

## Kongreso de ĈEA

Al nia 13-a kongreso en Šumperk (7-9 oktobro 2011) alvenis preskaŭ 80 personoj. Jam la vendreda vespero estis plena de programoj, kiuj okazis paralele en tri ĉambroj: Margit Turková informis pri haŝekologia konferenco, kiun ni jam prezentis en la pasinta numero, Petr Chrdle prelegis por la publiko pri temo *Esperanto - vojo por ekkoni la mondon kaj novajn amikojn*, Libuše Hýblová kaj Karel Vala raportis pri Universala Kongreso en Kopenhago, Mirka Tomečková pri blindula kongreso en Olomouc.



Eksterordinare interesa estis rakontado de skoltestro Kryštof Hyvnar el Kopřivnice, kiu trovis en arbaro Esperanto-monumenton, kiu estis inaŭgurita en 1951 en la urba parko, sed pro konstruado de novaj domoj likvidita post kelkaj jaroj. La skoltoj fakte trovis nur la ŝtonon sen tabulo, sed post informo aperinta en kabla televido, anoncis sin familio, kies avo Roman Michna (1915-2003) la tabulon savis. Nun oni pripensas, kiel renovigi la monumenton. La serĉado pri la historio de la monumento kondukis la skoltojn al Esperanto, ĉar la fondinto de skoltismo en ilia urbo Rudolf Zanáška (1907-1954) estis ankaŭ esperantisto kaj fondinto de Esperanto-kolekto en la urba

muzeo.

En alia ĉambro okazis diskutado pri necesaj korektoj en la asocia statuto kaj balot-elekta regularo, kiuj estis akceptitaj sekvatage.



La sabata antaŭtagmezo estis dediĉita al la kongresa traktado. Estraranoj prezentis kvar raportojn pri agado de la asocio dum la pasinta trijara periodo (ilia teksto aperos en [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz)). Sekve Petro Chrdle prezentis proponon por kvin novaj honoraj membroj de ĈEA: Jindřiška Drahotová, Viktor Dvořák, Miroslav Malovec, Margit Turková kaj Čestmír Vidman. Post aklama aprobo la ĉeestantaj honorigitoj ricevis diplomojn.

Poste estis prezentitaj kaj ankoraŭ diskutataj ŝanĝoproponoj en la statuto kaj balot-elekta regularo. Fine ili estis akceptitaj.



La kompleta teksto de ambaŭ gravaj dokumentoj legeblas kaj elŝuteblas en <http://www.esperanto.cz/cs/kontakty-a-organizace/cesky-esperantsky-svaz/co-je-ces>.

Nun povis okazi elektado de la nova asocia estraro. La kongreso aprobis jenajn funkciulojn: prezidanto - Vladimír Dvořák, vicprezidantino kaj komitatano A de UEA - Libuše Hýblová, vicprezidantino - Libuše Dvořáková, kasisto - Vratislav Hirš, komitatanoj - Pavla Dvořáková, Miroslav Hruška, Miroslav Malovec. Samtempe estis elektita revizia komisiono: Jan Řepa (prezidanto), Věra Gavandová, Ludmila Srbová.



*En la preĝejo*

La posttagmezan promenon tra la urbo vigle gvidis Kvido Janík, loka kluba prezidanto. Ni vizitis la urban teatron, kie la prizorganto s-ro Jílek montris al ni postkulisejon kaj ĉambrojn, kiuj estas por spektantoj normale nealireblaj. De tie ni foriris al iama, nun malkonsekrita preĝejo, kiu servas kiel koncertejo, por aŭskulti kelkajn mezepokajn francajn kantojn.

Antaŭ la vespermanĝo okazis ankoraŭ seminarieto pri tradukado, konversacia

kurso kaj prezento de la ĈEA-retejo. Post la vespermanĝo ĉiuj kolektiĝis en la salono por amuziĝi kaj danci ĉe muziko de unu muzikisto kaj unu kantistino. Tombolon denove sprite gvidis Kvido Janík.



*Danco kun tombolo*



*Muzika akompano por la dancado*

Dimanĉe estis prezentita nova estraro kaj ĝia laborplano, longe estis diskutata la kongresa rezolucio. Aparte okazis kunvenoj pri kluba agado kaj pri Esperanto-instruado.

Sincera danko apartenas ne nur al ekskomitatanoj pro ilia laboro, sed ankaŭ al Libuše Hýblová kaj ceteraj membroj de la gastiganta Esperanto-klubo Šumperk pro sukcesa organizado de la aranĝo.

*fotoj L. Dvořáková, L. Láni, J. Melichárková*

# Laborimpresoj pri la kongreso per okuloj de la nova ĈEA-prezidanto

Estimataj gesamideanoj,  
permesu al mi precipe por tiuj, kiuj ne povis partopreni ĉi-jaran kongreson en Šumperk, resumi kaj skizi ĉefajn aferojn miaokule.



*Laborkunsido pri balotregularo kaj statuto*

## 1. nova balotregularo

Aperis en ĝi gravaj modifoj, al kiuj apartenas:

- starigo de 3-membra balotkomisiono unu jaron antaŭ kongreso, kiu ne nur elektas, sed ĉefe kunordigas kandidatojn,
- transiro al prezidanta sistemo, en kiu ĉiu kandidato por prezidanto prezentas sian kompletan teamon kun disdividitaj funkcioj kaj laborkampoj,
- konkurso de unuecaj kandidatlistoj, kiujn balotkomisiono ne rajtas rifuzi,
- precipe pro tempomanko kaj facileco estas preferata publika voĉdonado, sed postulo de 1/3 sufiĉas por aranĝi sekretajn balotojn,
- ĉiu ĈEA-membro rajtas voĉdoni, sed elektita povas esti nur plenrajta membro
- unuavide oni voĉdonas inter kandidatlistoj por 5-7 membra unueca komitato, sed ekzistas ankaŭ rezervaj sistemoj ekde voĉdonado inter unuopuloj ĝis ko-

- optado kiel lasta savovarianto,
- la kongreso mem rajtas baloti plurajn du membrojn por la komitato, se oni opinias tion necesa,
- la revizia komisiono restas principe trimembra kaj elektita el unuopuloj.

La nova sistemo permesas, ke unuopaj kandidatoj por prezidanto povas laŭplaĉe krei siajn teamojn kun konkretaj celoj, kio devus ebligi instali pli harmonian kunlaboradon, en kiu jam anticipe ĉiu scias, kion li/ŝi faros.



*Laborkunsido pri balotregularo kaj statuto  
(gvidantoj de la diskuto)*

## 2. nova statuto

La statuto en kelkaj punktoj ne plu respondis al reala praktiko kaj ankaŭ bezonis multflanke modernigi. Mi mem engaĝiĝis en la aferon nur ĉi-printempe, sed mi konfesas, ke mi plimulton proponis kaj defendis.

La ĉefaj modifoj:

- ŝanĝo de ĈEA-sidejo al Esperanto-muzeo en Svitavy,
- pli moderna difino pri celoj kaj agadkampoj,
- pli preciza difino de organiza konsistado,

- pli detala priskribo de kongreso kaj konferenco (ekde voĉdonado ĝis necesaj materialoj),
- nova aranĝo de artikoloj pri kluboj kaj sekcioj,
- tute nova artikolo pri jura memstareco de kluboj/sekcioj kaj kiel atingi ĝin,
- ekspliko pri akcepteblaj limoj en la asocia fakturado el vidpunkto de kluboj/sekcioj,
- envicigo de fakaj grupoj kiel esprimo por membroiniciato kaj ebla partopreno de eksteruloj en komisionoj aŭ fakaj grupoj,
- unuigo kaj precizigo por la t.n. *subtenantaj* membroj,
- reconstruo kaj unuigo en artikoloj pri posedaĵaranĝo kaze de pereco de ĈEA aŭ de ĝiaj eroj,



Ambaŭ materialoj estas vere kompleksaj kaj plilarĝigitaj kaj trairis longan diskutadon monatojn antaŭ kaj ankaŭ horojn dum la kongreso. Espereble ili nun povas validi kelkajn plurajn jarojn sen grandaj ŝanĝoj. Ĉiu povas vidi ilin en kompleta formo sur ĈEA-retpaĝaro [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz), kiun mi vere rekomendas al ĉiuj de tempo al tempo trafoliumi, ĉar la estraro konsideras ĝin ĉefa fonto de aktualaĵoj kaj reciproka in-

formado por membroj en venonta periodo.

Mi volonte respondos eventualajn demandojn, skribu al [vl.dv@centrum.cz](mailto:vl.dv@centrum.cz).

### 3. balotoj kaj planoj

Aperis ĉiukongresa malsano – estis malpli da kandidatoj ol necesaj funkcioj. Kelkaj alparolitaj kandidatoj por prezidanto rekte rifuzis aŭ dumtempe rezignis kaj samo validis ankaŭ por aliaj funkcioj. Sekve kaj kiel kutime ne estis problemo esti elektita, multe pli problemo estis konvinki iujn kandidatiĝi. Mi tamen kredas, ke la nova estraro laboros sukcese kaj entuziasme.



*Prezentado de novaj taskoj kaj planoj*

Nia prezentata devizo tamen estis: **ASOCIO NE EGALAS AL ESTRARO.** Per tio ni volis substreki, ke necesas (kaj ni klopodos krei kondiĉojn) havi vivantan kaj funkciantan rilaton al membroj, ne malhelpi ilian iniciaton kaj komune revivigi kaj starigi laboremajn grupojn por konkretaj celoj kaj taskoj. Ne timu engaĝiĝi en priskribataj aktivecoj aŭ prezenti viajn projektojn aŭ planojn! Ĉiu povas aŭ skribi al unuopaj estraranoj aŭ mem distribui siajn ideojn pere de asociaj komunikiloj.

Bazajn informojn pri la estraro vi povas legi aliloke kaj pli precizaj informoj ankoraŭ aperos kaj en Starto kaj sur ĈEA-retpaĝaro.

Mi esperas, ke la estraro estas konvena miksaĵo el vidpunktoj de aĝo, sekso, loĝloko kaj sperteco. Tri membroj en la estraro restis dum aliaj tri jam membris en pasintaj periodoj kaj nur la lasta 22-jara estas vera novulo. Same grave estas, ke ĉiu jam anticipu sciis, kiun laborkampon li/ŝi prizorgos kaj kun kiu li/ŝi kunlaboros.

#### 4. Aktualaj taskoj

Dum la kongreso ni priskribis kaj priparolis bazajn urgajn taskojn, kiujn ni frontos kun helpo de ĉiuj ĈEA-anoj. Al konkretaj alvokoj apartenas :

- financa stabiligo kaj iom-post-ioma transiro al ekvilibrita budĝeto,
- provo engaĝiĝi en subvenciaj projektoj ekz. por malpliaguloj aŭ gejunuloj,
- uzado de modernaj teknologioj ekde retmesaĝoj ĝis interreto,
- prilaboro kaj aktivigo de membrobazo inkluzive funkciadon de komisionoj kaj laborgrupoj,
- projektoj de Esperanto-muzeo en Svita-vy.

Pli detalaj priskriboj sekvos en venontaj numeroj aŭ sur ĈEA-retpaĝaro.



Ni volonte bonvenigos ĉiun, kiu povas kaj pretas helpi en unuopaj laborkampoj. Sufiĉas nur skribi al konkretaj estraranoj aŭ rekte al mi (la adresaron vi facile trovos sur la interna kovrilpaĝo).

Pro multaj cirkonstancoj ne atendas nin facila tempo kaj nur ni komune povas montri, ke ni scias transvivi kaj ankaŭ ion proponi al cetera mondo. Mi kredas kaj esperas, ke ĉiu ĈEA-ano trovos terenon, kiun li/ŝi ĝuos kaj tiel alportos utilon kaj prosperon por aliaj.

Antaŭdankas  
Vladimír Dvořák  
*fotoj Libuše Dvořáková*

## Atentigo por F-membroj ricevontaj Starton

La nova ĈEA-estraro akorde kun kongresaj interparoloj decidis, ke dumvivaj membroj devos ĉiujare ĝis 31.1. anonci perpoŝte al la asocia adreso aŭ retpoŝte al [vhirsx@email.cz](mailto:vhirsx@email.cz) sian aktualan adreson, al kiu ni sendu Starton.

Al la nova regulo gvidas nin ekscio, ke ne ĉiuj dumvivaj membroj vere la gazeton postulas aŭ sufiĉas al ili Starto en elektronika formo sur la asocia retpaĝaro [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz). Krome kelkaj numeroj ĉiam revenas kaj por presi kaj dissendi la gazeton al F-membroj ĈEA ĉiujare elspezas ĉirkaŭ 30.000 CZK.

La estraro kredas, ke en interreta epoko ne estas granda problemo sendi senkoste unufoje en la jaro sian adreson, kaj tiel informi nin pri deziro plu Starton ricevadi en presita formo.

Alikaze ni konsideros, ke por vi sufiĉas la elektronika formo senpage disponebla. Tio sendube helpas al ni ŝpari monrimedojn kaj iom ekvilibrigi ĉiujaran deficitan budĝeton.

Dankon por via helpemo kaj komprenemo.

# Usnesení 13. sjezdu Českého esperantského svazu, který se uskutečnil v Šumperku od 7. do 9. října 2011

## Sjezd zvolil:

1. *členy výboru* pro volební období 2011-2014 ve složení: Vladimír Dvořák – předseda, Libuše Hýblová – místopředsedkyně, Libuše Dvořáková ze Svitav – místopředsedkyně, Vratislav Hirš – pokladník, Miroslav Malovec – člen, Pavla Dvořáková – členka, Miroslav Hruška – člen,

2. *revizní komisi* ve složení: Jan Řepa – předseda, Věra Gavandová – členka, Ludmila Srbová – členka.

## Sjezd schválil:

1. zprávu o činnosti ČES za minulé funkční období,

2. zprávu o hospodaření a zprávu dozorců rady za minulé funkční období,

3. propůjčení čestného členství Jindřišce Drahotové, Viktoru Dvořákovi, Miroslavu Malovcovi, Margit Turkové a Čestmíru Vidmanovi,

4. nový volební řád,

5. změnu stanov včetně změny sídla svazu.

## Sjezd ukládá:

1. výboru ČES provést jazykovou a stylistickou úpravu stanov a volebního řádu a v případě nepřijetí změny stanov upravit stanovy dle pokynů MVČR,

2. výboru ČES učinit kroky k postupné finanční stabilizaci ČES,

3. klubům a sekcím prostudovat si dokument „Právní postavení klubů/sekcí působících v esperantském hnutí“, který je umístěn na webu ČES a do 31.12.2011 nahlásit Libuši Hýblové své právní postavení a seznam představitelů včetně kontaktů.

## Sjezd doporučuje:

1. všem členům ČES sledovat webové stránky [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz) a používat ke komunikaci elektronickou poštu,

2. všem členům ČES propagovat Muzeum esperanta ve Svitavách a podporovat jeho činnost.

## Sjezd bere na vědomí:

vznik manuálu „Jak získat odvozenou právní subjektivitu“, který je dostupný na internetových stránkách ČES.

*V Šumperku 9. října 2011*

## Nove elektitaj funkciuloj



Vladimír  
Dvořák



Libuše  
Hýblová



Libuše  
Dvořáková



Vratislav  
Hirš



Pavla  
Dvořáková



Miroslav  
Malovec



Miroslav  
Hruška

Estraro  
de ĈEA



Jan  
Řepa



Věra  
Gavandová



Ludmila  
Srbová

Revizia  
komisiono



## Novaj honoraj membroj

nomumitaj dum la asocia kongreso  
oktobre 2011 en Šumperk



**Jindřiška Drahotová (1938)**, fraŭline Hegrová, iama flegistino en la urba hospitalo de Mladá Boleslav, prezidantino de loka E-klubo. Ŝi esperantigis la oficialan retejon de Mladá Boleslav kaj

kandidatis eĉ por la urba premio 2009. Ŝi estis ankaŭ iniciatinto de memortabulo por d-ro Josef Hradil. Kun aliaj klubanoj ŝi preparis jam ses *Legolibretojn* por komencantoj. Multe da tempo ŝi dediĉas al tradukado el Esperanto en la ĉeĥan lingvon por prui al la legantoj, ke Esperanto posedas sian literaturon (*Evropou a Asií na kole a s esperantem, Osm let na cestách po naši planetě, Člověk proti Babylonu, Nebezpečný jazyk, Srdce se zelenou hvězdou, Moje vyučování a dojmy z Iránu, Moderní robinzoni*).



**Viktor Dvořák (1936)** el Moravské Budějovice laboris ĉe esplorinstituto de nukleaj aparatoj en Přemýšlení-Zdiby.

Esperanton li komencis studi en 1947 aŭ 1949, poste li paŭzis kaj revenis al la movado kiel emerito. Li prizorgis esperantigon de la oficiala retejo de Moravské Budějovice, preparis en la urbo jam plurajn ekpoziciojn pri Esperanto kaj Komenio, Otakar Březina, Sankta Klement Maria Hofbauer-Dvořák. Eble lia plej granda publika sukceso

estis lia ideo donaci al la nove planata Nacia Biblioteko fondoŝtonon kun surskribo *Esperantisté ČR*, kiun gravuris Zdeněk Myslivec. Pri la transdono raportis Ĉeĥa Televido sabate la 17-an de majo 2008, ĉar temis pri la 40-a fondoŝtono, kiun la planata biblioteko ricevis. Kun M. Malovec li nun preparas libron de tradukoj el Otakar Březina, kiujn antaŭ kvardeko da jaroj preparis Tomáš Pumpr kaj Jiří Kořínek iniciate de Jaroslava Míčová (la tradukoj restis en la muzeo de O. Březina en Jaroměřice nad Rokytnou).



**Miroslav Malovec (1953)**, vendisto de elektronikaj vicpartoj en Brno. Li esperantistiĝis en 1968, asociiĝis en 1972, aktive eklaboris en 1976 en Lančov kaj junulara sekcio, poste

en la pedagogia. Dum certa tempo membro de Centra Komitato de ĈEA. Kiel membro de ekzamena komisiono li preparis *Gramatikon de Esperanto*, kunlaboris pri novaj lernolibro (V. Barandovská) kaj vortaroj (K. Kraft) kaj preparis por presado plurajn verkojn aperintaj ĉe KAVA-PECH (*Milito kontraŭ Salamandroj, Karolo la IVa, Ne nur soldato Švejk, Nový realismus, Aŭdienco, Baza ĉeĥa konversacio, Interlingvistika, KAEST 1998*). Ekde 1991 redaktoro de *Starto*, ekde 2008 ĈEA-komitatano kaj membro de muzea grupo. Li kolektas informojn por Memoro de Ĉeĥa Esperanto-Movado, sisteme enkomputiligas tekstojn por virtuala biblioteko (precipe verkojn de F. Omelka, J. Vondroušek kaj J. Kořínek), kontribuas al reta enciklopedio Vikipedio, kies ĉeĥan version li kunfondis.



**Margit TURKOVÁ (1939)**, fraŭline Kvietková, unue edziniĝinta kiel Strnadová, naskiĝis en Slovakio. Ŝi studis en agrikultura altlernejo en Prago. Esperanton ŝi eklernis en

1970, laboris en la komitato de ĈEA kaj prezidis ĉeĥan MEM-sekcion ĝis 1989, kunredaktis ĉeĥoslovakajn numerojn de *Paco*. Ŝi kunlaboris kun poetoj Jiří Karen, Josef Rumler, Věra Ludíková, Ljubov Vondroušková kaj nun precipe Ĉestmír Vidman, kies verkojn ŝi enkomputiligas kaj helpas publikigi (*Než padne mlha docela, S poutnickou holí - Kun pilgrimbastono, Sedmnáct slabik - Dek sep silaboj, Poutník K. H. M., Laskavá fantazie - Karesa fantazio*). Ĉeĥa Televido en sia programo por maljunuloj *Koloroj de la Vivo* prezentis ŝian esperantistan vivon al la vasta publiko. En 2011 ŝi reprezentis Esperanton en la haŝekologia konferenco *Moderna Progreso ĉiam viva!*, prezentante la esperantlingvajn tradukojn el Jaroslav Hašek. Pri la konferenco kaj ŝia partopreno informis ankaŭ faka bulteno de ĉeĥaj kaj slovakaj tradukistoj kaj interpretistoj.



**Čestmír VIDMAN (1921)** naskiĝis en la itala Monfalcone, sed estas ĉeĥa poeto kaj esperantisto. Li laboris kiel oficisto en Altforno Poldina en Kladno (1941-

1945) kaj en Organizo por Eksterlanda Komerco (1947-82). Samtempe li verkis poezion kaj dramojn. Multaj liaj poemoj

ekzistas en Esperanta versio, parte tradukitaj de li mem, parte de Josef Rumler kaj Jaroslav Krolupper. Li riĉigis la ĉeĥan literaturon per pluraj poemaroj (*Moře; Miska rýže; Vteřiny slunečních hodin; Hra zvaná život; Čím se líčíte, Ičiki; Pod horou Fudži; Křížalami voní dálka; Cestou; Vyhlížení k domovu; S poutnickou holí; Sedmnáct slabik; Laskavá fantazie; Poutník K. H. M.*) Li kontribuis ankaŭ al la ĉeĥa teatro (*Sama mezi všemi; Půlstoletí pod šminkou; Tvář herečky; Já, Kunhuta, královna česká; Já, Eliška Přemyslovna, královna česká; Já, Alžběta Rejčka, někdy královna česká; Stopa Locacorten; Paní v erbu lvíce; Brala jsem drogy; Já, Johana z Rožmitálu, královna česká*). La spektaklon pri Elizabeta Premislidino en sia propra esperantigo prezentis Eva Seemannová en la 81-a UK 1996 en Prago. Interesaj estas lia rememor-libro *Než padne mlha docela*, en kiu li parolas ankaŭ pri sia esperantista vivo. Li kontribuis ankaŭ al Ĉina Radio kaj verkis por ĉeĥlingvaj gazetoj artikolojn pri poezio en Esperanto, ekz. pri tradukoj de Josef Rumler el la verkaro de František Halas.



*La kongreson partoprenis nur tri novaj honoraj membroj*

# Agadraporto pri komputila klerigado, komputilaj projektoj de ĈEA, pri tradukado de turismaj tekstoj kaj publika informado pri Esperanto

## 1. Komputila klerigado

### 1.1. Instruado

Dum la trijara periodo estis organizitaj entute 9 komputilaj seminarioj — unutaĝaj aŭ semajnfinaĝaj, diversgradaj kaj diverstemaj, por sume pli ol 200 partoprenantoj. La ĉefa tiuspeca aranĝo estis trifoje okazinta internacia seminario Sabla Printempo (2009-2010 en Písek, 2011 en Milevsko), realigita parte kunlabore kun ĈEJ kaj E@I kaj dediĉita krom al Esperanto en Interreto ĝenerale alterne al diversaj trejnemoj: Vikipedio, ciferecigo, ĈEA-retpaĝaro, sonregistraĵoj, filmprilaboro. La aranĝo dufoje okazis kun financa subteno de la urbo Písek, pro konkreta informlaboro farita por subteno de la regiona turismo. En Svitavy estis realigitaj sume tri seminarioj: en aŭgusto 2009 kadre de la kluba forumo, dum la konferenco en oktobro 2009 okazis seminario por komencantoj kaj pri problemaro de asocia datumbazo kaj en januaro 2010 (kaj kunlabore kun ĈEJ)uzado kaj redaktado de E-retpaĝaroj kaj pri uzo de Esperanto-programaro.

Kadre de 50-jariĝo de E-klubo en Česká Třebová (en septembro 2009) realiĝis seminario pri uzado de la asocia retpaĝaro [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz). Krome okazis vikipedia trejnado en Pardubice (januaro 2010) kaj en Dobřichovice (kadre de KAEST en novembro 2008) kaj individuaj konsultiĝoj en aliaj urboj.

### 1.2. Instrumaterialoj

Estis eldonitaj du klerigaj kompaktdiskoj por partoprenantoj de Sabla Printempo (2009, 2010) kaj surbaze de la

unua versio estis preparita (kaj kompletigita) asocia KDo „Komputila klerigado“ (eldonita dum la konferenco en 2009) — ĉefredaktis kaj eldonis Pavla Dvořáková.

Estis verkitaj du **instrukciaj filmoj far** Vladimír Türk pri sonprogramo Audacity kaj filmprogramo Windows Movie Maker. Por informi membrojn pri uzado de Interreto, en STARTO aperadis ripete **Rekomendataj retpaĝaroj**.

En [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz) estis fonditaj ampleksaj helprubrikoj *Odkazy* (Ligiloj) kaj *Počítačová gramotnost* (Komputilaj kapabloj).



## 2. Asociaj projektoj

2.1. [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz) - la informretejo pri Esperanto precipe en Ĉeĥio kaj por ĉeĥoj estas prioritata longdaŭra projekto de ĈEA. Ĝia kreinto kaj teknika administranto ekde 2003 estas Aleš Tomeček, redakte kontribuadis ankaŭ Jiří Tomeček. En printempo 2010 la retejo estis komplete re prilaborita kaj redakte simpligita. Necesis krei por ĝi novan strukturon kaj plenigi grandparte per nova enhavo. Pri la retejo ĉefe zorgas Pavla Dvořáková, redakte kontribuas ankaŭ Miroslav Hruška kaj Miroslav Malovec, bedaŭrinde nur escepte aliaj (malgraŭ ke okazis du redaktoraj trejnadoj).

Kvankam la grafika aspekto ne multe ŝanĝiĝis (krom la antaŭnelonge aldonita fota ĉefpaĝo), en la retejo aperis pluraj novaj rubrikoj. Ekz. en la rubriko *O esperantu* (Pri Esperanto) ligilaro pri internacia lingva komunikado, Esperanto en ĉeĥlingva elektronika gazetaro, radioj kaj televido, ampleksa ĝenerala retligilaro, informoj pri rete elŝuteblaj instrumaterialoj kaj Esperanto-libroj, jam menciita ĉapitro pri komputila klerigado kaj kiel specialaĵo ligiloj al senpaga studado de pli ol 60 diversaj fremdlingvoj. La rubriko Aktualajoj iĝis pli densa kaj averaĝe ĝi alportas ĉ. 10 artikolojn monate (6 ĉeĥlingvaj kaj 4 esperantaj)

## 2.2 Asocia datumbazo kaj ciferecigo de Esperanto-materialoj

La unua versio de la interreta datumbazo estis bedaŭrinde senaverte nuligita de la servilprovizanto (fine de 2009), kio iom bremsis pluan laboron. Parte anstataŭas funkcion de la datumbazo Paĝo de Esperanto-Muzeo en Svitavy en Ipernity (ankoraŭ menciota). Ankaŭ en la asocia retejo, en ĝia ĉeĥlingva parto, troviĝas *Paměť českého esperantského hnutí* (Memoro de la ĉeĥa Esperantomovado) kun gravuloj de nia movado, gravaj eventoj, kongresoj, festivaloj, honorigoj ktp. La plej signifaj el ili estas priskribitaj detale en Vikipedio.

Pri ciferecigo de manuskriptoj kaj malnovaj libroj kaj gazetoj ĉefe zorgas Miroslav Malovec. Estis enkomputiligitaj manuskriptoj de Josef Vondroušek, Jiří Kořínek, Miloš Lukáš, Tomáš Pumpr kaj František Omelka kaj aliaj postlasaĵoj, skanitaj miloj da paĝoj de gazetoj, bultenoj, dokumentoj, broŝuroj, libroj eldonitaj de ĉeĥaj esperantistoj dum la pasinta jarcento.

Planita ligo kun la interreta datumbazo de E@I BRETARO ĝis nun ne okazis, ĉar la projekto ne estis plene funkciigita. Bedaŭrinde mankas ĝis nun mono por bonkvalita cifereciga softvaro rekonanta ankaŭ esperantajn supersignojn, kio komplikigas kaj malrapidigas la laboron.

Delico de doloro (Blaho bolu)  
(Goethe)

Tradukis Jiří Kořínek. L. van Beethoven.  
Op. 83, n. vo 1.

Andante espressivo.

Brilu nur, brilu nur, larmoj e-ternaj de l' a - mo!

Bri-lu nur! Aĥ, al o - kul' duon-seki-ĝinta dezerta kaj'

### 2.2.1 Muzika kaj voĉa datumbazo

Kadre de tiu ĉi projekto Miroslav Malovec skanis ĉ. 200 tradukojn de **operarioj** far Jiří Kořínek kaj estiĝis minimume 50 novaj literaturaj kaj muzikaj **registraĵoj** kaj novaj kantradukoj (en kio engaĝiĝis precipe V. Türk, M. Smyčka, P. Dvořáková, J. Řepa, M. Turková k.a.), publikigataj precipe en la muzea paĝo en Ipernity. Krom verkoj de Karel Čapek - kadre de aparta projekto dediĉita al li - estis registrita ekz. *Vojo de lumo* de Komenio, *Majo* de Mácha, *Kluzo* de Šrámek, *Mesaĝo* de Věra Ludíková k.a.).

En 2009 estis eldonita duobla KD *Melodia regalo* de Miroslav Smyčka (kun unu KD de nove faritaj registraĵoj) kaj ĉ. 15 pliaj estis aperigitaj en Ipernity. Tiel estis unufoje registritaj ekz. *Serenado* de Schubert, *Kanto de l' Ligo* de Mozart, *Largo* de Dvořák, ĥoralo *Sankta Venceslao*, *La Paloma* de Yradier kaj multaj aliaj. Aperis novaj tradukoj kaj registraĵoj de *Bela rozo* (Krásná růže v sadu kvetla) kaj *Paŝtisto de bovinoj* (Hlídač krav de J. Nohavica) far V. Türk k.a. Grava atingiĝo estis, ke danke al iniciato de esperantistoj la ĉefa retejo de Jarek Nohavica nun enhavas ankaŭ Esperantotradukojn de liaj kantoj.

### 2.2.2. Kantaro

Unua etapo – kolekto de tekstoj – nuntempe plejparte pretas. Necesas aldoni mankantajn aŭtorinformojn, prizorgi aŭtorrajtojn, decidi pri muziknotoj, gitarakordoj kaj pri formo de eldono.

2.2.3 „Elektronika multimedia antologio“ omaĝe al kvardekjariĝo de ĈEA – aperis kadre de la ĈEA-konferenco en 2009. Ĝi estis unua provo amatore resumi diversajn gravajn kaj tiutempe akireblajn dokumentojn (inkl. fotoĵojn, muzikregistraĵojn kaj videofilmetojn). La eldono okazis kunlabore kun aktivaj membroj kaj kluboj de ĈEA. Krome estis pretigitaj por ĈEA-membraro internaj eldonoj de kompaktdiskoj pri elektronikaj libroj kaj Esperanto-muziko (2009-2010) kaj E-filmetoj I kaj II (2010). Pri la kompilado kaj eldono ĉefrespondecis Pavla Dvořáková.

2.3. Vikipedio – multlingva interreta enciklopedio disponigas nuntempe senpage en Esperanto pli ol 155 000 artikolojn, kio estas - je 17 mil pli ol antaŭ unu jaro.

Ĉeĥaj kontribuantoj kreis dum 2008-2011 minimume **1000 novajn artikolojn** - precipe pri Ĉeĥio (komunumoj kaj memorindaĵoj), ĉeĥaj elstaruloj, pri ĉeĥa E-movado, trafiko kaj aliaj temoj.

El inter ĈEA-membroj kontribuis precipe Miroslav Malovec, Pavla Dvořáková, Josef Hron, Pavel Nechvíle, Karel Votoček, Miroslav Hruška, Vladimír Dvořák, Vladimír Türk.

Inter aliaj ĉeĥoj – nemembroj de ĈEA – estas longdaŭre aparte aktiva Petr Tomašovský, inter ĈEJ-membroj kontribuas plej multe Marek Blahuš, kiu kune kun M. Malovec provizas ankaŭ ĉeĥan Vikipedion per temoj rilataj al Esperanto.

Speciale merita estas la aktiveco de Josef Hron, kiu ene de unusola jaro pretigis pli ol 400 artikolojn pri municipoj de la regiono Pardubice (kaj aliaj temoj), kiuj estas ofte pli informriĉaj ne nur ol la angla- aŭ germanlingvaj, sed nemalofte eĉ pli ol la ĉeĥlingvaj versioj! Plej supezeble Regiono Pardubice nun estas plej detale prilaborita geografia regiono en Esperanta Vikipedio entute (de la tuta mondo!).

Artikolo pri komponisto Antonín Dvořák gajnis lastjare duan premion en la internacia vikipedia konkurso. Por alkitimigi esperantistojn legi Vikipedion kaj por altigi ĝian prestiĝon, ekde septembro 2010 ĝis aŭgusto 2011 aperadis en [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz). ĉiumonata vikirevuo MOZAIKO kun elekto de altkvalitaj interesaj artikoloj pri plej diversaj fakoj. La projekto estos daŭrigata ekde januaro 2012 en ŝanĝita formo.

### 3. Tradukado de turismaj tekstoj

La projekto estis realigita en pluraj manieroj:

1. verkado por **VIKIPEDIO** (plurcent artikoloj pri municipoj kaj memorindaĵoj)
2. fondo de laborgrupo de tradukemuloj [etradukado@esperanto.cz](mailto:etradukado@esperanto.cz) (komuna retejo GoogleGroups tamen ne montriĝis bone uzebla kaj nova maniero, verŝajne per viki-teknologio, estas nun serĉata) – estis kreita bazo por konsulta laborvortaro en Excel kaj okazis komuna korektado de pluraj tradukataj tekstoj
3. okazis specialaj lingvaj seminarioj pri ĉiĉeronaj temoj (Netolice, parte Tábor, Milevsko), por kiuj estiĝis instrumaterialoj parte disponigitaj, parte plu prilaborataj.

4. kreo de esperantlingvaj tekstoj aŭ broŝuroj – ekz. pri Prostějov, Šumperk, Písek k.a., prezento de Pardubice en PowerPoint

5. filmprilaboro – Esperanto-paroligo aŭ subtekstigo de profesiaj filmoj (Zvíkov, Písek, Jindřichův Hradec, Biciklovagoj tra mikroregionoj Netolice kaj Milevsko, Petr Vok diboĉulo, Arkeoparko Netolice k.a. kaj kreo de propraj filmetoj – Netolice, Kratochvíle, Brno; pretigatas filmeto pri burgo Kašperk – J. Pěnek).

Grandan parton teknike realigis V. Türk, kiel laŭtleĝanto partoprenis J. Řepa k.a.

6. estis publikigitaj Esperanto-versioj en pluaj oficialaj municipaj retpaĝaroj en Esperanto – Moravské Budějovice (Z. Hršel), Písek (V. Dvořák), Arkeoparko Netolice (V. Türk), Mladá Boleslav kaj Mnichovo Hradiště (J. Drahotová), Žirovnice, Rynárec (M. Kašparů), Sudmoravia trafiksystemo Kordis (M. Hruška). Finatas kaj pretas por publikigo Kastelo Kratochvíle, monaĥejo Milevsko kaj Muzeo de Škoda en Mladá Boleslav

#### 4. Publika informado pri Esperanto

Por ĉeĥlingvaj interesatoj estis en [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz) kreitaj novaj rubrikoj „O esperantu“ kaj „Odkazy“ kun listo de gazetartikoloj, televid- kaj radioelsendoj (kun retligiloj), ĉeĥlingvaj aktualaĵoj, informoj pri studeblecoj de Esperanto k.t.p. Artikolojn en paperformaj gazetoj daŭre kolektas J. Čejková kaj prezentas ilin en Esperanto-Muzeo. Okazis pluraj publikaj prelegoj kaj estis publikigitaj artikoloj de P. Chrdle.

Aparte grava sukceso estis eldono de la ĉeĥlingva versio de „Malkovru Esperanton“ (komuna verko de ILEI kaj E@I) en aprilo 2011 (tradukis Vladimír

Kolář kaj Milada Kolářová, kiu bedaŭrinde ne ĝisvivis la paperan aperigon). Nuntempe ni fine posedas bonkvalitan modernan allongan informilon, kiun eblas proponi al ekstera publiko kaj ĵurnalistoj. La broŝuro estas moderpreze (kontraŭ 30,-Kč) vendebla ĉe Libroservo kaj en Esperanto-Muzeo en Svitavy.

Specifaĵo de la ĵus pasinta trijara periodo estas publikaj ekspozicioj, kiuj okazis en minimume 18 lokoj!

1) Migra ekspozicio „Ĉu esperanto estas morta lingvo?“ (aŭtoro: Pavla Dvořáková) estiĝis en marto 2010 en Písek kun financa subteno de la urbo. 23 paneloj A1-formataj kaj libroekspozicio estis prezentitaj ankaŭ en bibliotekoj České Budějovice, Milevsko, Pelhřimov, Jindřichův Hradec, kaj muzeo Poděbrady. La ekspozicioj estis kompletigataj per programoj por publiko, gazetartikoloj kaj ampleksa reta invitkampanjo.

2) Ekspozicio *Pocta Komenskému* (aŭtoro: Viktor Dvořák) okazis en februaro 2010 en Moravské Budějovice kaj sekve ankaŭ en Jaroměřice nad Rokytnou.

2) Ekspozicio *Otokar Březina en Esperanto* (aŭtoro: Viktor Dvořák) estis prezentita en Muzeo de Březina en Jaroměřice n. R. de majo ĝis aŭgusto 2010 kaj en Moravské Budějovice en majo 2011

3) Ekspozicio omaĝe al 100 jaroj de Esperanto en Pardubice (aŭtoro: Jarmila Rýznarová kaj membroj de E-klubo) realiĝis en 2009 kaj 2010 en Regiona biblioteko Pardubice kaj sekve ankaŭ en Přelouč kaj Býšť.

3) Ekspozicio omaĝe al 100-jariĝo de Esperanto-klubo en Olomouc (aŭtoro: Jan Duda) okazis en Regiona Scienca Biblioteko Olomouc en februaro kaj majo 2011.

4) En Esperanto-muzeo Svitavy (inaŭgurita en septembro 2008) en 2008-2011 okazis entute 5 diversaj ekspozicioj. Samloke estas konstruataj ankaŭ virtualaj kolektoj.

#### 5. Nova fenomeno - Esperanto en sociaj retejoj

1) En Facebook membras minimume jam kelkdek ĈEA-membroj. Ekzistas tie pluraj internaciaj grupoj rilataj al Esperanto. La retejo estas uzata ankaŭ por diskonigo de aktualaĵoj en [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz).

2) En Ipernity, kie troviĝas tre forta kaj aktiva internacia Esperanto-komunumo, membras nun ĉ. 20 anoj de ĈEA kaj aliaj ĉeĥaj esperantistoj. Novaĵo de tiu ĉi jaro (ekde 5.1.2011) estas paĝo de Esperanto-muzeo en Svitavy ĉe Ipernity <http://www.ipernity.com/home/181031>.

Nuntempe ĝi havas 1713 retajn membrojn el 90 landoj kaj atingis jam pli ol 20 000 virtualajn vizitojn. En 22 albumoj ĝi disponigas preskaŭ 800 dosierojn (artikoloj en blogo, elektronikaj artikoloj kaj libroj, fotoĵoj, filmoj, sonregistraĵoj). La retejo servas parte ankaŭ kiel provizora solvo de la datumbaza projekto, sed precipe por aktiva ligo de internaciaj kontaktoj kaj diskonigo de E-Muzeo.

*Raportis Pavla Dvořáková, ĈEA-estrarano pri projektoj kaj kluboj*

## Monda Pupekspozicio per Esperanto

Kun la ĉeesto de la urbestro kaj la ĉefaj amaskomunikiloj (NHK, Yomiuri, Asahi, Nihon Keizai, ktp.) la 1-an de oktobro 2011 estis inaŭgurita la 'Monda Pupekspozicio per Esperanto' en Izucu Yaŝiki-sidejo de la Nova Turisma Asocio en la urbo Higashi-

kagawa.

En mia inaŭgura parolado kiel prezidanto de la Asocio, mi esprimis, ke ĉi tiu ekspozicio klare montras la gravecon de kulturaj interŝanĝoj, kion 25 artikoloj en la gazetaro de 11 landoj el 4 kontinentoj prave montris.

630 pupoj el 22 diversaj landoj el Azio, Afriko, Orienta Eŭropo kaj Sudameriko estis montrataj dum 10 tagoj en laŭlandaj standoj. La vizitantoj trovis informojn pri la landoj kaj ilia rilato kun Japanio en la aldonaj paneloj bele ornamitaj per fotoj pri turismaj allogaĵoj, mapoj kaj la fotoj pri la pupsendintoj. La pupoj estis el porcelano, ligno, ŝtofo, ktp. kaj portis tradiciajn vestojn.

Unu el la plej valoraj kontribuoj estis farita de Vlad'ka Chvatálová, ĉeĥa Esperantisto laboranta kiel EU-interpretisto kaj gvidanto de la orfejo 'Nabouba' en Benino. Ŝi kolektis 52 interesajn pupojn el Benino, Ganao kaj Togolando kaj grandpakaĵe ilin portis al Belgio kaj de tie sendis al Japanio.

Ekstere la gastoj estis bonvenigataj de 22 flagoj kaj interne apud kartona tergloblo troviĝis Esperanto-flago por montri, ke la kolekto estis farita dank'al Esperanto-parolantoj.

Proksimume 10 000 homoj vizitis la eventon.



*fotis: Atilio Orellana Rojas*

*Informis: Etsuo Miyoshi, prezidanto de la Nova Turisma Asocio*

## Memortabulo por Josef Hradil

La 12-an de oktobro 2011 estis solene inaŭgurita memortabulo por kuracisto kaj esperantisto, honora membro de ĈEA, d-ro Josef Hradil, en la vestiblo de la pensiono Espero en Skokovy. *Ĉi tie vivis, kuracis kaj instruis Esperanton oferema homo MUDr. Josef Hradil, 22.11.1924 - 26.10.2008*, anoncas la surskribo ĉeĥe kaj Esperante.



La memortabulon iniciatis esperantistoj el la Esperanto-rondeto de d-ro Hradil en Mladá Boleslav. La ĉefan paroladon prezentis Jindřiška Drahotová, ĉeestis ankaŭ Petr Chrdle kaj Margit Turková, sian salutparolon sendis Jarmila Rýznarová. La tabulon senvualigis filo kaj nepo de d-ro Hradil, ambaŭ portantaj la saman nomon. Ĉeestis ankaŭ kreinto de la tabulo, skulptisto Zdeněk Myslivec el Boskov, vilaĝestro de Žďár Josef Houska kaj vicurbestro de Mnichovo Hradiště Josef Bína.

D-ro Josef Hradil estas konata pro sia medicina terminaro, pro redaktado de la bulteno *Medicinstaj Informoj - Sano*, kaj pro stencilita informilo el Mnichovo Hradiště *Verda Familio*.

## Esperanto prezentiĝis ĉe Semajno de volontulado

Merkrede la 2-an de novembro 2011 Esperanto prezentiĝis en Prago dum *Semajno de Volontulado*. Ĝi okazis kadre de Eŭropa Jaro de Volontulado, kiun proklamis EU. La prezentadon gvidis Ĉeĥa Esperanto-Junularo (ĈEJ) kunlaborante kun aliaj E-kluboj en Ĉeĥio.



Petrik, Drahotová, Hruška, Mrázek, Závodská, Tomeček

Al la vizitantoj Esperanto prezentiĝis ne nur kiel lingvo, sed ankaŭ kiel praktika komunikilo. Spektebla estis ekzemple la filmo *Esperanto estas ...*, kiu montras, por kio eblas uzi Esperanton – kaj uzeblas vere ĉie. Ekde scienco, tra literaturo ĝis amuziĝo.

Montritaj estis ankaŭ kelkaj libroj kaj gazetoj en Esperanto, interesiĝantoj povis pleniĝi testeton de konoj de Esperanto kaj esperantaj realaĵoj. Ĉar la kvizo enhavis ankaŭ facilan gramatikan ekzercon, la vizitintoj povis mem konvinkiĝi, kiel rapide Esperanto lerneblas.

Prezentita estis ankaŭ nova konkurso, kiun ĈEJ organizas, kaj en kiu eblas por ellerno de Esperanto gajni partoprenon ĉe internacia E-aranĝo eksterlande.

Laŭ <http://mladez.esperanto.cz/>



## Semajno de volontuloj en Muzeo de Muziko Prago 31. 10. - 6.11. 2011

La 2-a de novembro 2011 estis mia feliĉa tago. Ĉar efektiĝis ideo, kiu min kaptis antaŭ tri monatoj, kiam petis min direktoro de „OAZA“, kie ni uzas klubejon kun aliro al interreto, traduki al Esperanto artikolon pri volontuleco. Tradukante ĝin, mi ekkonis fakton, ke ĉiu samideano (ne ĉiu esperantisto) estas volontulo. Do mi volis utiligi mian alian, pli vastan kaj interesan tradukon de la libro pri Bona Espero – instituto en Brazilo. Tiu eduka instituto estas unika ekzemplo de volontuleco de esperantistoj, krome ĝi kortuŝis min pro ĝia kvindekjara historio, ĉar literaturo „de faktoj“ estas mia hobbio.

Post tri monatoj finfine ekkredis eĉ organizantino de „Semajno de volontuloj“, ke Esperanto estas konvena por prezenti sin dum tiu semajno, aranĝita fare de ministerio por edukado, junularo kaj sporto. Mi tuj informis ĈEJ kaj ĈEA. La aktivuloj ankaŭ agis tuj. Petis alian tempon por prezento kaj venis kun sia juna entuziasmo.



*Pavla Zemanová kun kobajo Knoflíček  
(Butoneto)*

Kortuŝis min Pavla Zemanová kun sia „saniganta“ kobajo, vera ekzemplo de voluntulino. Oferema Margit Turková venis kun ŝi kaj raportis pri Vikimano en Svitavy. Sinjoro Jiří Patera serioze observis nin, ŝajne kontenta, Petro Chrdle venis kun dorsosako plena de libroj. Jan Pospíšil aperis kaj iel malaperis. Bára, Miro, Dan, Jiří Tomeček kaj Pavol Petrik lerte manipulis kun siaj aparatoj kaj havis multon inter si por debati.

La Muzeo de Muziko en Karmelitská strato estas impona palaco, estis multe da prizorgantoj. La programo estis bone preparita, certe malavare subtenita. Ĉu la aranĝo plenumis sian taskon? Mi ne scias.

Du aferoj kaptis min: <http://soutez.esperanto.cz> sur granda verda afiŝo: „Eklernu Esperanton ĝis januaro kaj gajnu ekskurson eksterlanden“ kaj [www.byznysprospolecnost.cz](http://www.byznysprospolecnost.cz), entrepreno, kiu prizorgas por neprofitaj organizoj laborantojn el fabrikoj kaj entreprenoj por helplaboroj dum diversaj aranĝoj de tiuj neprofitaj organizoj, laŭ ia ŝtata leĝo.

Ĉar mi tro frue devis foriri, mi atendas ian sciigon pri la fino de la prezento de Esperanto fare de junularo, nia nova generacio.

*J.Drahotová*

### ***33-a seminario en Skokovy***

*paroligis ĉiujn Esperante danke al francino Nicole. Okazis multaj prelegoj (pri Kopenhago, botanikaj interesajoj, haŝekologia konferenco, Avino el Skokovy), senvualigo de memortabulo por d-ro Hradil kaj marda vizito de Mladá Boleslav, kie ĉe Universitato de Tria Aĝo prelegis Max Kašparů pri Nuntempa familio kaj ĝiaj problemoj. Venonta seminario: 16-22 aprilo 2012*

## Kampanjo EFS

Antaŭ dek jaroj Esperantic Studies Foundation (ESF) financis grupon de entreprenemaj gejunuloj por fondi la retejon **Lernu.net**. La sukceso de tiu ĉi iniciato superis ĉiujn niajn atendojn. **Lernu** fariĝis vigla reta komunumo kun pli ol 106 mil uzantoj (kaj la nombro daŭre pligrandiĝas), kun pli ol cent mil paĝrigardoj ĉiutage! Hodiaŭ la retejo estas konata ĉie tra la mondo: fakte, estas uzantoj de Lernu en 240 landoj kaj teritorioj!



Kompreneble, la disvolvo de Lernu bezonas sufiĉe grandan aldonan investon de ESF, kaj pro tio, ke la Fondaĵo subtenadas ankaŭ plurajn aliajn projektojn kaj iniciatojn, tiu tasko postulas komunan strebon grandigi la ESF-kapitalon. Kiel parto de tiu ĉi strebo, la organizo E@I (“Esperanto@Internet”) lanĉis la donac-kolektan kampanjon “100 000 eŭroj por ESF”.



Ni petas vin konsideri fariĝi **ESF-donacanto**. Vi povas donaci unufoje aŭ ĉiumonate, per la reto aŭ per ĉeko. Kiel donacanto, vi estos rekonita sur nia virtuala "Muro de Donacantoj" de nia retejo.

**UEA-konto:** esfo-p,

**Retaj donacoj:**

<http://kampanjo.ikso.net>, aŭ

<http://esperantic.org/eo/donacoj/rete>

*Humphrey Tonkin  
Prezidanto de ESF*

## Fervojista konferenco en Rakovník

Ekde la 30-a de septembro ĝis la 2-a de oktobro 2011 renkontiĝis ĉeĥaj esperantistaj fervojistoj en tenis-centro apud Rakovník. Ili tie rememoris la majan IFEF-kongreson en Liberec per mallonga filmo kaj fotoj kaj disdonis diplomojn al tiuj, kiuj meritis pri la kongreso. Sabato estis dediĉita al vizito de Fervojista Muzeo en Lužná u Rakovníka. Kunsidis ankaŭ estraro de Ĉeĥa Fervojista Esperanto-Asocio. Venis eksterlandaj gastoj el Aŭstrio, Germanio kaj Hungario. Organizo de la konferenco estis ĉefe laboro de s-ino Anna Abelovská.



## Kvakera kurso en 15 lingvoj

La kvakera movado ekestis en Anglio, kaj pro tio la modernaj eŭropaj kvakeroj multe uzas la anglan internacie. Tial estas ĝojige ke nova interreta kurso, kiu prezentas kvakerismon al novuloj, aperas en 15 lingvoj, kaj ke inter tiuj estas la ĉeĥa kaj Esperanto.

Kvakerismo estas sendogma religio kun radikoj en la kristismo de la 17-a jarcento, sed ĝi krevigis la limojn de religia dogmo. Kvakeroj kredas, ke en ĉiu homo troviĝas io dieca, kaj ke pro tio ĉiuj havas eblon senpere ricevi inspiron el la dia fonto. Eŭropaj kvakeroj ne havas liturgion aŭ pastrojn, sed renkontiĝas ie kaj iam ajn en kuna silento, en la kredo ke ĉiuj tagoj kaj ĉiuj lokoj estas egale sanktaj.

La kurso celas konatigi interesiĝantojn pri la kvakeraj tradicioj kaj praktiko per interdiskutoj ĉirkaŭ klasikaj kaj klarigaj tekstoj. Oni partoprenu en miksa grupo kun 5-10 novuloj kaj jamaj kvakeroj, skribante en la retejo siajn pensojn kaj reagojn. La grupo traktas po unu temo semajne, dum dek semajnoj.

Douglas Draper  
[douglas.esperanto@gmail.com](mailto:douglas.esperanto@gmail.com)  
Kvakera Esperanto-Societo  
[www.kveker.org/kes\\_kes.htm](http://www.kveker.org/kes_kes.htm)

La kurso mem estas ĉi tie:  
[www.noos.ch/kes/eo/novajoj\\_eo.php](http://www.noos.ch/kes/eo/novajoj_eo.php)

*Pavel Marušinec*

## Filatelistoj en Prago

Esperanto-sekcio de Asocio de Ĉeĥaj Filatelistoj kunlabore kun Esperanto-Ligo Filatelista okazigis en Prago en la tagoj de la 8-a ĝis la 11-a de septembro 2011 renkontiĝon de filatelistoj, kiuj kolektas esperantaĵojn.



La partoprenantoj ne nur aŭdis prelegojn, sed vizitis ankaŭ la 14-an Internacian Foiron de Kolektantoj kaj Esperanto-muzeon en Svitavy.

La 9-an de septembro 2011 la ĉefa poŝtoŭficejo en Prago uzis porokazan stampon.

*Vladislav Hasala*

## Renkonto en Putim

la 15-an de oktobro 2011 ekzercigis naŭ partoprenantojn pri ĉiĉerona vortprovizo per interpretado de turismaj ŝildoj. Ili partoprenis fiŝrikolton kaj irante laŭ „Spuroj de Ŝvejk“ venis al la ĝendarmejo, kiu aperis en la libro kaj koncerna filmo. V. Türk eĉ rolis Ŝvejkon kaj M. Smyčka ĉefĝendarmon Flanderka en sceneto, pri kiu estis farita filmeto. Bierumante „Ĉe Cimbur“ ĉiuj aŭskultis malenuan esperantigitan eseon de d-ro Putna pri Putim, Hašek kaj Ŝvejk.

# KELI-kongreso 2011

La 61-a KELI-kongreso okazis 2.-9.8.2011 en la ĉeĥa kuraĉloko Poděbrady. Estis jubilea kongreso pro la centjariĝo de KELI. Pro la subita morto de nia estrarano kaj iama prezidanto Jacques Tuinder (10.1.1933 — 18.6.2011), kiun dum pli ol 40 jaroj inspiris Zamenhof kaj Jesuo batali per la organizo *Evidente* kontraŭ nenecesa blindeco en la mondo, la kongreso estis ankaŭ nekrologe memoranta.



Partoprenis 49 personoj (5-93jaraj) el 13 landoj kaj travivis bele organizitan kongressemajnon preparitan admirinde de la sekretario Pavel Polnický. Surprizo estis la vizito de 2 indonezianoj dum 2 tagoj survoje hejmen post la UK.

Okazis festa malfermo en la urbodoma salono kun la partopreno de urbestro Dr. Ladislav Langr kaj sinoda senioro Joel Ruml. Ricevis donacojn pro demisioj el la estraro Els van Dijk, NL, kaj Siegfried Krüger, DE, kiel kasisto.

Ni partoprenis malfermon de la ekspozicio en la urba muzeo "Ĉu Esperanto estas morta lingvo?" kun partopreno de ĝia aŭtorino Pavla Dvořáková.

La kongresanoj loĝis en sufiĉe proksi-

ma hotelo, de kie ili post 10-minuta promenado laŭlonge de la rivero Elbo atingis la eklezian centron kun preĝejo. La manĝoj estis kunaj en la centro kaj en la manĝejo de proksima baneja domo.



La taga programo komenciĝis per matena kaj finiĝis per vespera preĝo. Dum unu horo okazis komuna kantado uzante la libron *Adoru*. La partoprenantoj kontribuis per diverstemaj prelegoj, ekzemple pri H. A. Luyken, verkisto kaj KELI-prezidinto, Gramatikaj obstakloj en Esperanto (Ed Borsboom, NL), Kristana mistiko kaj kristanaj mistikuloj (Siegfried Krüger, DE), Naskiĝo de baptismo en Rusio (Viktor Gromov, RU), Mihály Munkácsy - hungara pentristo, Ferenc Liszt - hungara komponisto (Ágnes Ráczkevy Eötvös, HU).

Okazis memora diservo pri Jacques Tuinder, dulingva diservo kun bapto kaj Sankta Manĝo kun la loka komunumo.

Ni spektis:

- country-dancojn en la plenumo de loka grupo de pensiuloj...

- koncerton de lokaj gimnazianoj - kantis Barbora Scholcová kaj Jana Knížková, plane akompanis Ondřej Vávra.

Dua parto kun vokala grupo Blujaj Floroj sub gvido de Ondřej Vávra

- koncerton de operetaj kaj operaj kantoj kun Kateřina Kudlíková kaj Miroslav Smyčka en la piana akompano de Pavel Pichl.



Ekskursoj:

- promeno tra la urbo sub la gvido de d-ino Jana Hrabětová  
 - tuttaga al Kutná Hora kun Unesko-kulturheredaĵoj). Ni vizitis katedralon de Sankta Barbara, Vlašský dvůr - Italan korton (monerproduktejo), Preĝejon de la virgulino Maria kaj ostejon Kostnice.

Revene ni trarigardis Sukerbetan Fer-vojeton kun veturo.



- duontaga al kastela ĝardeno kun statuoj de Matyaš Braun kaj al evangelia paroĥejo en Lysá nad Labem kaj naturmuzeo

en Přerov nad Labem sub la gvido de ĝia direktoro d-ino Jana Hrabětová.

La jarkunveno de KELI decidis pri la nuligo de la Ligo en NL kaj refondo en FR, decidis pri statutŝanĝo, adiaŭis la longjara sekretario el la estraro kaj elektis posteulon.

*Siegfried Krüger  
 KELI estrarano*

\* \* \*

## Doktoreco pro honoro

Merkrede la 28-an de septembro 2011 Max Kašparů ricevis el manoj de rektoro el “Akademio de Sankta Elizabeta” en Bratislava gradon de doktoro pro honoro. Dum solena parolado ĉe promocio li menciis ankaŭ Esperanton, ĉar por samideano estas ĉefa tasko fari propagandon ĉiupaŝe.



## IKUE-anoj en Žirovnice



Renkontiĝon de katolikaj esperantistoj en Žirovnice (9.-11. septembro 2011) iomete komplikigis fermo de trajna trako inter Počátky kaj Žirovnice, sed post telefona SOS-voko savis nin la ĉefa organizanto Max Kašparů per sia aŭtomobilo. Loĝado, manĝado, prelegoj kaj preĝado en kapelo, ĉio ĉi okazis en renovigita paroĥa domo.



La unua vespero estis dediĉita al projekciado de videoj pri la ĉi-jara IKUE-kongreso en Zagrebo, pri renkontiĝo en Nitra kaj pri aliaj aranĝoj. Sabate ni aŭdis prelegon de inĝ. Kalný, vicprezidanto de la sekcio, pri la vivo de Johano Nepomuk Neumann (1811-1860), episkopo en Filadelfio, unua uso-

na sanktulo. Lia patrino estis ĉehino, patro germano, li naskiĝis en Prachatice, vizitadis lernejon en České Budějovice, teologion li studis en Prago. En 1836 li ricevis inviton al Usono, kie li estis ordinita kiel sacerdoto. Dum sia misiista laboro li fondis cent lernejojn kaj okdek preĝejojn. En 1852 li iĝis episkopo en Filadelfio kaj en 1860 mortis surstrate pro infarkto.

Antaŭtagmeze ni ankoraŭ vidis la urban kastelon, kie post incendio estis trovitaj fragmentoj de antikvaj freskoj, kaj la iaman grentenejon, kie ni konatiĝis kun la vivo de vilaĝanoj antaŭ jarcentoj.



*Nova estraro de la sekcio*

Posttagmeze la konferenco de la sekcio elektis novan estraron. Poste en loka preĝejo 90-jara pastro Xaver Kobza celebris sanktan meson, parolis diakono d-ro Max Kašparů. Tiu havis ankaŭ vesperan prelegon, kiun vizitis ankaŭ lokaj neesperantistoj, ĉar Max Kašparů scias paroli sprite kaj atentokapte. La prelego estas legebla en lia ĉehlingva broŝuro *Pri vagaj ŝtonoj kaj vagaj cirkloj*. Dimanĉe matene li parolis pri hipnoto kaj pri diversaj mitoj cirkulantaj inter la publiko pri ĝi.

*Zdenka Novotná*

## Esperanta Vikimano

*Wikimania* estas internacia renkontiĝo de uzantoj kaj precipe kontribuantoj al la interreta enciklopedio Wikipedia (la ĉi-jara okazis en aŭgusto en israela Hajfo). Esperanta versio de Vikipedio ofertas nuntempe pli ol 155 mil artikolojn kaj inter pli ol 270 lingvaj versioj estas laŭ amplekso sur la 27-a loko. Ĝi estis funkciigita la 6-an de novembro de 2001 (unu jaron pli frue ol la ĉeĥa) kaj ĝian dekjaran naskiĝtagon oni decidis festi inter la 26-a kaj 30-a de oktobro per *Esperanta Vikimano* en Svitavy. Venis trideko da personoj, krom Ĉeĥio el Belgio, Francio, Germanio, Hungario, Nederlando, Pollando kaj Slovakio. Ne mankis ankaŭ fondinto de la esperantlingva versio usonano Chuck Smith.



La organizantoj estis ĈEA (representata de Pavla Dvořáková kun edzo Vladimír) kunlabore kun loka klubo (Libuše Dvořáková) kaj organizo E@I (Marek Blahuš, Yves Nevelsteen el Belgio kaj SKEJ-prezidantino Katarína Nosková). La aranĝon finance subtenis la urbo Svitavy kaj regiono Pardubice. Kiel plua trejnisto estis invitita ankaŭ Miroslav Malovec, kiu antaŭ dek jaroj laŭ instigo de Chuck Smith fondis la

ĉeĥan version de Vikipedio. Ĝuste tiu fakto vekis grandan intereson de amas-komunikiloj. Krom multnombraj gazetanoncoj realiĝis kvar televid- kaj ses radioelsendoj sur tutŝtata kaj regiona niveloj (vidu [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz)).



Ĵaŭde la 27-an de oktobro 2011 akceptis ĉiujn urbestro de Svitavy, magistro David Šimek, en la urbodomo, poste sekvis tuttaga trejnado ĉe komputiloj en la apuda gimnazio kaj parte en la studenta tranoktejo, ankaŭ por la loka publiko.



Vendrede alveturis multaj gastoj por partopreni prelegan matineon en la salono super nia Esperanto-muzeo. Alvenis denove ankaŭ la sinjoro urbestro por saluti la aranĝon.

En la unua prelego Chuck Smith rakontis pri Ward Cunningham, kiu kreis pro-

gramon por kunlaborigi homojn en interreto kaj nomis ĝin WikiWikiWeb (1995) laŭ havaja ekspresa buso Wiki Wiki, kio en la havaja signifas Rapidega Rapidega. Tiu programo ebligas al multaj homoj redakti komunajn projektojn.



Jimmy Wales kaj Larry Sanger kreis retan enciklopedion Nupedia (2000), sed ĝi kreskis nur malrapide. Poste venis al ili ideo uzi por ĝi la programon Wiki, ili akceptis en la teamon ankoraŭ teknikiston Brion Vibber kaj la 15-an de januaro 2001 ili lanĉis novan enciklopedion sub la nomo Wikipedia, kompreneble en la angla lingvo, sed ili antaŭvidis multajn aliajn lingvojn.

Chuck Smith, tiam 22-jara studento, komence opiniis Vikipedion stultaĵo. En februaro li eklernis Esperanton kaj rapide progresis. Post kelkaj monatoj, kiam li denove enrigardis Vikipedion pro scivolemo, li vidis tie jam kelkcent seriozajn artikolojn kaj ŝanĝis sian opinion. Nun li komencis kredi, ke Vikipedio povus helpi ankaŭ al Esperanto. Li skribis al Brion Vibber, kiu ankaŭ montriĝis esperantisto, esperantigis surskribojn kaj klarigojn necesajn por uzantoj kaj la 15-an de decembro 2001, omaĝe al la naskiĝtago de Zamenhof, li lanĉis la esperantlingvan Vikipedion.

Miroslav Malovec poste rakontis, kiel li trovis informon pri la enciklopedio en la marta numero 2002 de la revuo *Esperanto*, tuj li aliĝis kaj sub gvido de Chuck komencis kontribui. Novembre ili konatiĝis en Dobřichovice dum KAEST kaj Chuck proponis, ke Miroslav ĉefigu ĉiujn surskribojn kaj klarigojn de Vikipedio kaj sendu la tradukon al Brion Vibber. Post dusemajna laboro la ĉeĥa Vikipedio estis lanĉita ĝuste je Silvestrotago 2002. Pli precize dirite, lanĉita en la ĉeĥa lingvo, ĉar anglalingve ĝi jam ekzistis ekde majo, sed neniu volis enmeti ĉeĥlingvajn artikolojn en anglalingvan retejon.

Sekvis prezento de Marek Blahuš "Ĉeĥa Vikipedio en ciferoj" kaj brila ampleksa analizo "Esperanto en Vikipedio".



Pavla Dvořáková prezentis rezultojn de projektoj pri diskonigo de ĉeĥa kulturo, ĉeĥaj urboj kaj vidindaĵoj pere de Vikipedio. Krome ŝi per pianludo kaj Miroslav Smyčka per kantado prizorgis muzikan programon inter la unuopaj prelegoj.



Poste ĉiuj iris malsupren al nia muzeo por solene tosti al dekjarigo de Esperanta Vikipedio kaj rigardi la ekspozicion pri Esperanto kaj spiritaj tradicioj de la mondo. Posttagmeze estis por nevikipediistoj preparita duhora seminario pri Esperanto en Interreto, precipe pri novaĵoj en la ĈEA-retejo [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz) kaj pri paĝaro de Esperanto-Muzeo ĉe Ipernity.

Sabate estis ekskursata posttagmezo, per aŭtoj al Litomyšl, urbo de la esperantista verkisto Karolo Piĉ, kies tombon en Litomišla tombejo kelkaj vizitis.



Sed antaŭe ĉiuj iris al la kastela parko kun skulptaĵoj de Olbram Zoubek. Sekvis vizitoj de la originala kastela teatro el la 18-a jarcento, nobelaj ĉambroj en la kastelo kaj loĝejo de familio Smetana en la apuda bierfarejo, kie naskiĝis komponisto Bedřich (Frederiko) Smetana.

En la studenthejma salono okazis ankaŭ diskutoj kaj pluraj prelegoj, ekzemple pri komputilterminaro *Komputeko* de Yves Nevelsteen, pri Kantarovichio, aŭ pri maniero, kiel enmeti bildojn en Vikikomunejon, el kiu poste povas ĉerpi ĉiuj lingvaj versioj. Katarína Nosková prezentis interretajn projektojn de E@I. i.a. Slovake.eu, retejo por instrui la slovakon lingvon (ankaŭ per Esperanto).



Marek Blahuš detale raportis pri Vikimania en Hajfo, kiun li partoprenis kiel stipendiano danke al sia sukcesa partopreno en vikipedia konkurso. Per multaj lumbildoj li povis informi pri ĉefaj personoj en la nuntempa Vikipedio, pri novaj tendencoj kaj planoj de la projekto. Li ankaŭ renkontiĝis kun lokaj esperantistoj kaj danke al Josi Ŝemer kaj Amri Wandel vizitis Jerusalemon kaj Mortan Maron.




La ĉefa celo de Vikimania tamen estis eduki novajn aktivajn kontribuantojn al la enciklopedio. Ili ekregis bazajn redaktajn kapablojn kaj vere ĉiuj kelkajn artikolojn verkis kaj enmetis. Same progresintoj estigis artikolojn pri la urbo kaj la regiono, ankaŭ en siaj gepatraj lingvoj, por montri al la subvencidonintoj utilecon de Esperanto.

*fotoj J. Malá, M. Blahuš, L. Dvořáková, I. Gavanda*

# K filosofickým základům jazykového universalismu (Od Komenského k Zamenhofovi)

Mirek Čejka



*Dr. Mirek Čejka, syn zakladatele našeho esperantského hnutí Theodora Čejky, je významný český jazykovědec (filozofie jazyka, čínština, slavistika, edice památek české literatury)*

Naše téma je součástí neobyčejně důležité kapitoly z historie evropské kultury. Ale proč je naše téma pro tuto kapitolu tak důležité? Vysvětlení se nám dostane, budeme-li chtít odpovědět na otázku, jak vznikla Evropa v dnešním slova smyslu a co utvářelo od počátku charakteristické rysy její kultury.

Evropa nebyla nikdy totožná s Římským impériem s jejím dominantním jazykem - latinou: Římské impérium zahrnovalo jen její část a zároveň přesahovalo do Asie a Afriky. Evropa vzniká až s jeho rozpadem a po něm. Tehdy dost bouřlivě vstupuje na západě Eurasijského superkontinentu na místo starého Říma do dějin rodina nových národů. Není to rodina ladná a harmonická, je to rodina stále se svářící a plná nestejnorodých zvyků, idejí, náboženství, a hlavně mluvící desítkami různých a navzájem často dosti nesrozumitelných jazyků, jichž během historie ještě přibývá.

Latina, která i po pádu západořímské říše měla na evropském západě dominantní postavení, upevnila si svou starou pozici v souvislosti s christianizací ještě více než dříve. Dokonce i právní normy germánských kmenů byly sepsány latinsky, a to i u těch kmenů, kde převládalo

ariánství a kde se liturgie konala v domácích jazycích lidových. Avšak s postupující provincializací a gentilizací, jež nastávala v době přechodu do středověku zejména jednak u Germánů a jednak na Iberském poloostrově, dostal vývoj latiny v různých oblastech svůj odlišný regionální charakter; vznikly tzv. „národní jazyky“: italština, španělština, francouzština a rétorománština. Tzv. karolínská renesance 8. a 9. století měla sice za následek návrat k očištěné latině, ale jejím dalším důsledkem bylo, že se z této „čisté“ latiny stal už jazyk umělý. Od té doby se literární vzdělání, a tím ani teologie, a dokonce ani modlitba již nerealizovaly v mateřském jazyce. Latina se stala jazykem vzdělanosti, jemuž se bylo třeba učit, jazykem, pro nějž lidé přestali mít přirozený cit a který byl už od národních společenství odrůzen. V takovéto podobě (a vlastně díky ní) však zůstala latina universálním nadnárodním jazykovým médiem Západu.

Jazykové poměry byly v Evropě za tzv. latinského středověku a raného novověku velmi podobné dnešní situaci sanskrtu a klasické arabštiny. Obyvatelé našeho kontinentu mluvili zprvu mateřskými jazyky vývojově na úrovni staré angličtiny, staré skandinávštiny, staré francouzštiny, popř. praslovanských dialektů, a později jejich novověkými verzemi. Od 6., 7., popř. 8. století latina přestávala a nakonec přestala být jazykem mateřským, protože jí už nikdo nepoužíval od útlého dětství. Latina se však až do raného novověku proto ještě nestala jazykem mrtvým. Metaforicky bychom mohli říci, že během středověku a většinou i dlouho po něm spočívala jen v jakémsi limbickém zázvětí jako jazyk neživý, ale zároveň i nemrtvý. (pokrač.)

## Ĉu la homoj savos Aralon?

Laŭ lastatempaj indikoj ŝrumpado de la Arala lago ne nur ĉesis, male: ĝia akvonivelo malrapide leviĝas danke al tio, ke ĉesis terura elĉerpado de la akvo el ĝiaj vivodonaj riveroj. Estis likviditaj ampleksaj rizejoj kaj kotonplantejoj. Uzbekio ĉesis esti la plej granda eksportanto de kotoneno en la mondo. (Ĉu estis la kotoneno fakte tiel bezona?)

Estas malfacile renovigi fragilan ekologian ekvilibron, kiu estis senrespekte rompita, kio rezultigis ekologian katastrofon. Sovetiaj ekonomiistoj eĉ dum multaj jaroj planis alidirektigi siberiajn riverojn en Centran Azion! Nur Gorbaĉov tion definitive rifuzis. Male Ĉinio planas konduki akvon el suda Ĉinio, kie ĝi abundas, al norda Ĉinio, kie ĝi mankas. Albert Einstein diris: „Ekzistas nur du senfinaj aĵoj: kosmo kaj homa stulteco, sed pri la unua mi ne estas tute certa.“

En luktado inter ekologio kaj ekonomio kutime venkas ekonomio. Ekologio estas konforma al „diaj muelejoj“, kiuj muelas sekure, sed malrapide. Ekonomio estas konforma al homa vivo, kiu estas ĉiam pli kaj pli rapida, do ekonomio postulas rapidan profiton.

Nur futuro, kiun ni ne ĝisvivos, montros finan sorton de Aralo, ŝumavaj arbaroj kaj similaj.

*Lubomír Středa*

*Aralo en 2009  
(el Vikipedio)*



## Silvestro en Česká Třebová

okazos la 29-an de decembro 2011 je la 19-a horo en Sport Klubo (antaŭe Horbytko), strato Litomyšlská (kiel pasintjare). Temo de la vespero: **Malnovaj mi-**



**toj ĉeĥaj.** Aliĝon kun kotizo 200 Kč sendu al Svatopluk Čech, Javorka 980, 560 02 Česká Třebová, 465 537 788, 723 071 996, emilka.kr@seznam.cz. Kiu bezonas tranokton, kontaktu tranoktejon Adamen, Nové náměstí, 773 600 091, JPetrova@seznam.cz, prezo 250 Kč en plurlita ĉambro, 350 Kč en unulita.

## Helpu fondi en Ĉinio Esperanto-muzeon

Laŭ propono de s-ro Sun Mingxiao, delegito de UEA en Zaozhuang pri ĉina kulturo, la direktoro de Zaozhuang-a Universitato, kie oficiale funkcias Esperanto-leciono, konsentis fondi Esperanto-Muzeon en la Universitato, por ke oni gardu Esperantan kulturon. Por konvinki aliajn estraranojn bonvolu sendi esperantaĵojn al s-ro Sun Mingxiao, la respondeculo por la muzeo. Finfine la direktoro povos doni ĉambrojn kaj monon por la muzeo.

Adreso: s-ro Sun Mingxiao, Zaozhuang Xueyuan Guojichu Shandong. Ĉinio. CN-277100

Tel: 866323786905  
poŝtel: 8613396376717  
retadreso: semio@163.com

## Ni ne devas silenti

*Kiam mi antaŭ pluraj jaroj kiel juna esperantisto ekvidis ĉi tiun titolon de ĵus eldonita eksterlanda broŝuro, mi ne povis kompreni ĝian sencon, la simpla frazo aperis al mi stranga, nelogika. Esperanton mi estis lerninta komence laŭ la tiam plej populara lernolibro kiel memlernanto kaj poste en rekt-metoda kurso por komencantoj. Tie mi - kune kun la aliaj gekursanoj - estis instruata, ke negacio de verbo estas esprimata - tute simple - per antaŭmeto de la partiklo „ne“ antaŭ la koncernan verbon, do „mi estas - mi ne estas, ili laboris- ili ne laboris“. Ke ekzistas unu modala verbo, ĉe kiu la menciita simpla regulo ne validas, ni tiam ne sciis. Ĉeĥa kaj slovaka leganto, kiu tiun ĉi tutan alineon plene komprenis, ne bezonas legi plu.*

Teprve po letech jsem se v nejkompetentnějším esperantském slovníku, Plena Vortaro de Esperanto, dočetl, jak to se záporom u slovesa „devi“ vlastně je. Že „ne devi“ znamená „nesmět“. To, že tento fakt uvádějí i další vydání slovníku, nasvědčuje tomu, že se věc netýká jen Čechů, Slováků a Němců. Jazykem Zamenhofovy rodiny byla ruština, latinské „non debo“ = „nesmím“ mu nebylo neznámé, francouzština, stejně jako ostatní románské jazyky z ní vycházející. Je velmi pravděpodobné, že se s angličtinou seznámil natolik, aby věděl, co znamená „I must not“.

Kde je chyba, že čeští (a slovenští) esperantisté nemají v této věci jasno? Jakto, že Zamenhofův úzus - vycházející z latiny - byl poprvé (a naposled) Čechům vysvětlen v učebnicích Eduarda Kühnla před sto lety? Ani jediná

učebnice, cvičebnice, ani jediný slovník, ani jediná mluvnice vyšlá od té doby, kdy vyrostly tři generace, neobsahuje zmínku o záporu slovesa „devi“. Naopak: vznikl a byl používán novotvar „darfi“ - smět, např. v překladu Čapkovy *Bílé nemoci* v roce 1938 a ve slovenských slovnících nedávné doby. Nezna-mená to, že naši učitelé neměli v této věci jasno? Sotva najdeme učebnici angličtiny pro Čechy, která tvar „must not“ nevysvětluje.

Esperanto jakožto jazyk mezinárodní, který aspiruje na funkci spolehlivé a přitom snadné mezinárodní komunikace, si nemůže dovolit, aby připustilo vznik nářečí, které by se od normy lišilo v tak základní věci jako je zápor modálního slovesa. Kdo si to uvědomí, musí to podle svých sil napravit. Nesmíme mlčet.

Pokud ve svém slovníku nenajdete, že „nemuset“ je „ne bezoni“ a že „nesmět“ je „ne devi“, pak si to tam dopište a zapamatujte.

Sám si kladu za vinu, že jsem to jako spolupracovník Kraftova Česko-esperantského slovníku v plné míře neprosadil.

14. listopadu 2011  
Zdeněk Hršel

## UEA-membraro

UEA nun havas 5292 individuajn membrojn kaj 2500 amikojn ĉe Facebook. UEA esperas atingi nombron de almenaŭ 5300 individuaj membroj. Plena membreco inkluzivas ankaŭ Jarlibron kaj revuon Esperanto, parta nur Gvidlibron (Jarlibro sen Delegita reto). Aliĝi eblas ĉe nia ĉefdelegito por Ĉeĥio Petr Chrdle [chrdle@kava-pech.cz](mailto:chrdle@kava-pech.cz).

## Jiří Pištora

1931 - 2011



Honora membro de ĈEA Jiří Pištora forpasis la 12-an de novembro 2011 en aĝo de 80 jaroj. Li naskiĝis la 7-an de marto 1931 en Dobruška, lernis fa-

kon de maŝina mekanikisto, studis en fervojista teknikumo kaj poste dum la tuta vivo laboris kiel memstara esploristo en la fako de fervoja riparado (1956-1991).

Esperanton li lernis en 1947 en Nymburk. En 1960 li iniciatis kune kun Jindřich Štancl kaj František Jindra rondeton „Amikeco“ en Česká Třebová, kiun li prezidis dum pluraj jaroj. Li estis kunfondinto de Tutŝtata Ĉeĥoslovaka Fervojista Esperantista Asocio (1965), kiun fervojista kongreso en Hamar akceptis kiel membron de IFEF. J. Pištora organizis ankaŭ karavanon al IFEF-kongreso en Avignon (1969) kaj distribuis revuon „Internacia Fervojisto“.

Ĉar lia hobbio estis historio de fervojo, en la jaro 1985 li fariĝis administranto de la urba muzeo, kiu jam 14 jarojn estis deponita en netaŭgaj humidaj ejoj. Li savis la kolektojn kaj kiam emeriteco liberigis lin de lia profesio, li fariĝis eĉ direktoro de la muzeo. En tiu funkcio li savis ankaŭ 5 mil librojn de la praga klubo, kiu perdis sian klubejon. Biblioteko Jaroslav Šustr transiris al Česká Třebová kiel bazo de nova Esperanto-kolekto (1993), kiun baldaŭ riĉigis ankaŭ primovadaj dokumentoj de niaj kluboj. La postenon li forlasis en 2003, tamen la kolekto restas daŭre en la muzeo.

-mm-

## Esperanto 125

En la 26-a de julio, 2012, ni markos la 125-jaran jubileon de la aperigo de la Unua Libro. Tio estas la plej signifa jubileo tra la sekvaj kvin jaroj. Pasintan novembron ILEI lanĉis projekton ‘esperanto125’ por utiligi tiun datrevenon. Por reciproka kunlaboro kaj informado ILEI volas havi en unuopaj landoj landajn reprezentantojn kaj laborgrupojn. Mi konsentis fariĝi reprezentanto kaj la laborgrupo plue konsistas el Miroslav Hruška, Miroslav Malovec kaj Jana Melichárková. Por sukceso de la projekto gravas ekaktivigo de ĉiuj kluboj, rondetoj kaj unuopaj esperantistoj. Temas precipe pri informado kaj lingvaj kursoj, kiujn devus organizi laŭeble ĉiu rondeto aŭ klubo. Informante pri la jubileo en amaskomunikiloj eblas informi publikon entute pri Esperanto, ĝiaj utileco kaj uzebleco en internacia komunikado kaj kiel helpilo en lernado de plua(j) fremda(j) lingvo(j). Dank‘ al tia plialtigo de tre malmultaj (laŭ mia kaj certe ankaŭ laŭ via sperto) scioj, kiujn havas la publiko pri Esperanto, estos pli facila varbado por lingvaj kursoj. Instruado kaj lernado de la lingvo estas ununura, kaj do la plej grava ebleco, kiel multigi vicojn de E-parolantoj. Malgraŭ tio, ke Esperanto estas facile lernebla (sed ne facila!) lingvo, sen lernado ne eblas ĝin posedi. Por ke mi povu informi ILEI pri nia agado, ĉu pri publikigado de informoj, ĉu pri kursoj aŭ pri alia agado, mi bezonos informojn de vi kaj ankaŭ mi dissendos al vi konsilojn kaj instigojn, sed reciproke vi povas sendi la viajn al mi, por ke mi povu diskonigi ilin al ĉiuj.

Josef Vojáček, [jvojesp@gmail.com](mailto:jvojesp@gmail.com)

# KALENDARO

## Kalendaro 2011

2011-12-29 Silvestro en Česká Třebová,  
Inf.: [emilka.kr@seznam.cz](mailto:emilka.kr@seznam.cz)

## Kalendaro 2012

2012-04-16/22 34-a seminario en Skokovy,

Inf.: [drahotovaesperanto@seznam.cz](mailto:drahotovaesperanto@seznam.cz)

2012-07-10/15: La 18-a Internacia Medicinista Esperanto-Kongreso en Opava kun la ĉeftemo „Depresio kiel kromefiko de kronikaj malsanoj“. Info: [Eva.Kopecna@ivax-cz.com](mailto:Eva.Kopecna@ivax-cz.com)

2012-07-14/20: Internacia Esperanto-Konferenco de OSIEK en Svitavy. Tutsemajna aranĝo kun la temo „Sciencfikcia literaturo kaj robotoj“ kaj ĝia turisma antaŭprogramo en Prago 2012-07-08/14. Info: [www.kava-pech.cz/iek](http://www.kava-pech.cz/iek) aŭ [chrdle@kava-pech.cz](mailto:chrdle@kava-pech.cz)

2012-09-13-16: La 6-a kongreso de AEH-IKEH (handikapitaj esperantistoj) en ripozdomo Štíří důl u Krucemburku (Skorpija valo ĉe Krucemburk. Info: [aeh-ikeh@volny.cz](mailto:aeh-ikeh@volny.cz)

2012-09-27/30: Trilanda konferenco - Komuna konferenco de aŭstraj, ĉeĥaj kaj slovakaj esperantistoj. Info: [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz) aŭ [komitato@esperanto.cz](mailto:komitato@esperanto.cz)

## Deziras korespondi

**José Luis Montes de Oca**, Ap.post. 10, CU-53000 Santo Domingo, Villa Clara, Kubo, prezidanto de EK „Verda Lumo“, 63-jara, kolektas glumarkojn kaj bildkartojn.

**Walter Cárdenaz Crucero las Casimbas**, CU-53000 Santo Domingo, Villa Clara, Kubo, 18-jara knabo.

**Luis Angel Martinez**, Calle 2da n-ro 11, Finca Santo Olaya, CU-53000 Santo Domingo, Villa Clara, Kubo, 19-jara knabo.

**Rachel Cabrera**, Calle Ind. Demcía n-ro 165, CU-53000 Santo Domingo, Villa Clara, Kubo, 15-jara knabino.

**Raichel Garcia Pérez**, Calle Ira Final, Finca Santo Olaya, CU-53000 Santo Domingo, Villa Clara, Kubo, 29-jara fraŭlo.

V. Hasala

## Korekto

En Belartaj Konkursoj 2011, UEA anoncis, ke en la kategorio Eseo la duan premion gajnis Jan Werner el Slovakio. Montriĝis, ke temis pri Jan Werner en Brno.

## Hron-vortaro - 9-a versio

ĉe la retejo <http://www.esperanto.wz.cz/>, apartenanta al Jaroslav Veselý, estas elŝutebla jam la 9-a versio de giganta vortaro de Josef Hron, ankaŭ kun instrukcioj por uzo.

**Nauĉ se esperanto a vyhraj** je soutěž České esperantské mládeže pro mládež do 30 let, která se dosud esperanto neučila. Podmínky najdete na <http://soutez.esperanto.cz>.

## Nové internetové stránky

mládeže <http://mladez.esperanto.cz>  
Lančova <http://www.set-lancov.cz>

## ELNA MATLAND forpasis

Honora Membro de UEA s-ino Elna Matland forpasis la 23-an de novembro en Bergeno, Norvegio. Ŝi estis prezidanto aŭ sekretario de la lokaj kluboj en Bergeno kaj Sauda, estrarano de Norvega Esperantista Ligo kaj gvidis ĝin kiel prezidanto de 1985 ĝis 1991. De 1983 ĝis 1995 ŝi reprezentis NEL en la Komitato de UEA. Kulmino de ŝia esperantista agado estis la 76-a UK en Bergeno en 1991, kies Lokan Kongresan Komitaton ŝi prezidis. En 1992 UEA elektis ŝin kiel Honoran Membron. En 2009 ŝi ricevis la Reĝan Arĝentan Medalon pro Merito kiel rekonon de ŝia laboro kiel instruistino kaj de ŝia agado en sindikato.

Gazetara komuniko de UEA

## Jak platit svazu

### Pozor, změna účtu!

Platit lze poštovní poukázkou A (poplatek 22 Kč do 5000 Kč) nebo převodem na účet **2800186228/2010, variabilní symbol** má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete na emailovou adresu L. Hýblové a Vr. Hirše seznam, za koho platíte.

Seznam čísel (ukončení variabilního symbolu):

- 06940** členství ČES
- 06941** členství UEA
- 06942** předplatné Starta bez členství
- 06943** dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
- 06944** poplatek UK
- 06945** kongres EEU
- 50400** komise pedagogická ILEI
- 50401** písemný kurs začátečníci
- 50402** písemný kurs pokročilí
- 50404** Paroliga kurso
- 50405** svazové zkoušky
- 50800** sekce nevidomých LIBE
- 50900** sekce zdravotníků UMEA
- 51000** sekce křesť. esp. KELI,  
vlastní b. ú. 211 768 239/0300
- 51100** sekce katol. esp. IKUE,  
vlastní b. ú. 86-7290070227/0100
- 51200** sekce informatiky
- 70100** komise pro tisk a inf.
- 80200** ediční fond
- 80300** propagace v tisku
- 80400** fond Tilio

### Upozornění

#### pro sekce, kluby a kroužky ČES

Občanská sdružení jsou podle vyhl. 634/2004 Sb. osvobozena od placení poplatků za ověření listiny - t.j. položka 4 - a za ověření podpisu - t.j. položka 5.

## Zájemci o časopisy

Předplatné časopisů zajišťuje Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651, [polnicky@quick.cz](mailto:polnicky@quick.cz). Předplatné uhradte na účet u Poštovní spořitelny v Poděbradech, č. ú. 231 798 902/ 0300, konst. symbol 0379 a variabilní symbol uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.

### POZOR: změna PŘEDPLATNÉHO!

**Monato:** 1020,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4, rete 610,-Kč  
**La Gazeto:** 550,- Kč, v.s. 07002, 6 čísel ročně, 32 stran formátu A5

**La Ondo de Esperanto:** 520,- Kč, v.s. 07003, 11 čísel ročně, 24 stran formátu A4, reta versio 310,- Kč.

**Juna Amiko:** 280,- Kč, v.s. 07004, 3 čísla ročně, 50 stran formátu A5  
**(POZOR: při platbě do 31.12.2011 pouze à 240 Kč na 2012 a 2013!)**

**Literatura Foiro:** 1130,- Kč (\*750,- Kč), v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A 5

**Heroldo de Esperanto:** 1210,- Kč (\*810,- Kč), v.s. 07006, 17 čísel ročně, 4 strany formátu A 3

**Femina:** 750,- Kč (\*500,- Kč), v.s. 07007, 4 čísla ročně, 28 stran formátu A4

\*cena v závorce platí pro členy "Esperanta civito".

**Periodikum Českého esperantského svazu - 42. ročník**

**Redaktor: Miroslav Malovec,  
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

**malovec@volny.cz**

**<http://members.chello.cz/malovec/>**

**Předplatné v Česku (bez členství ve svazu): 200 Kč**

**Členská evidence a změny adres:**

**p/a Libuše Hýblová, Bohutín 136, 789  
62 Olšany, libusehyblova@seznam.cz,  
tel. 774 928 974**

**Uzávěrka příštího čísla: 1.2.2012**

-----  
**Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio -  
- 42-a jarkolekto**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj  
aŭ rekte ĉe nia Asocio**

**Abonprezo: 10 eŭroj, ekster Eŭropo  
13 eŭroj**

**(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)**

**Redaktoro: Miroslav Malovec,  
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,**

**Ĉeĥio, malovec@volny.cz**

**<http://members.chello.cz/malovec/>**

**Presis: DTP centrum, Svitavy**

**Redakto-fermo de la sekva numero:  
1.2.2012**

**ISSN 1212-009X**

**Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.**



## **Demandaro pri informado al ĈEA-membroj**

Konsciante la ekonomian situacion la nova estraro starigis demandojn kiamaniere ĈEA informu siajn membrojn ĝustatempe kaj ekonomie.

Ni konkludas, ke :

- pres- kaj dissendo-kostoj senĉese kreskas kaj kreskos,
- pli kaj pli da homoj ekuzas interreton,
- interreto estas taŭga rimedo por rapida informado.

Malgraŭ malfacila situacio ĈEA por siaj servoj ne volas senkonsidere altigi la membrotizojn kaj vere aprezas ĉiujn, kiuj regule kaj ĝustatempe dum multaj jaroj pagas siajn membrotizojn kaj per tio ankaŭ pruvas sian ligitecon al la tutmonda esperantistaro kaj komprenon, ke sen asocioj baldaŭ ne plu ekzistus la movado.

Male oni dum la kongreso diskutis eventualan malaltigon ĉe A- kaj B-kategorioj kaze ke oni rezignos pri Starto en presita formo kaj uzos ĝian elektronikan formon sur la asocia retpaĝaro. La estraro ĝenerale aprobas strebon utiligi modernajn, rapidajn kaj malpli kostajn komunikilojn kaj ne volas kontraŭstari tion.

Krome por certigi la aktualajn koncentriĝintajn informojn jam nun servas rete distribuataj ĈEA-retkomunikoj, kies senpagan abonon ĉiu ĈEA-membro rajtas peti ĉe [miropiro2312@gmail.com](mailto:miropiro2312@gmail.com) .

Memkompreneble ĉiu, kiu deziras plu ricevadi Starton en kutima presita formo kiel gazeton, eksentos neniun ŝanĝon krom tio ke iom povus ŝanĝiĝi enhavo, ĉar ĝi ne sukcesas ekkapti ĉiujn aktualaĵojn por kiuj pli kaj pli servos ĈEA-retpaĝaro [www.esperanto.cz](http://www.esperanto.cz) kaj ĈEA-retkomunikoj.

La estraro volonte aŭdos vian opinion por plu decidi kaj tial starigas kelkajn demandojn, al kiuj bv. respondi ĝis 31.1.2012 perpoŝte a retpoŝte al la adresoj de nia estrarano Vratislav Hirš (rigardu la kovrilpaĝon).

Eblas respondi simple jes aŭ ne aŭ kromsendi siajn opiniojn kaj rekomendojn. La respondoj povas esti anonimaj (ekz. senditaj de nekonata retadreso) por ke vi ne timu malkaŝe esprimiĝi!

1. Mi volas nepre ricevadi plu Starton en la presita formo jes - ne
2. Se jes, mi preferas pro kreskantaj pres- kaj dissendo-elspezoj prefere
  - a) pagi pli en membrokotizo
  - b) adaptiĝi al malpli da numeroj ĉiujare
3. Se ne, mi dezirus (eblas elekti pli da variantoj, kiuj ne kontraŭas)
  - a) malaltigon de membrokotizoj
  - b) mi tolerus konservi membrokotizojn por iom stabiligi la asocian budĝeton
  - c) nepre krom elektronika Starto ricevadi ankaŭ ĈEA-retkomunikojn
  - d) havi senpagan aliron al elektronika Starto
  - e) eĉ ne havi Starton aŭ ĈEA-retkomunikojn
4. Mi havas mian retadreson
  - a) jes kaj aktive uzas ĝin
  - b) jes, sed preskaŭ ne uzas ĝin
  - c) ne, sed mi volus ĝin
  - d) tute ne
5. Rilate al interreto
  - a) mi senprobleme kaj ofte uzas ĝin
  - b) mi porokaze uzas ĝin senprobleme
  - c) fojfoje kaj kun helpo mi uzas ĝin
  - d) mi ne interesiĝas pri ĝi

Nome de la estraro mi anticipas dankas al ĉiuj, kiuj pretos respondi, ĉar nur ambaŭflanka diskuto povas al ni helpi trovi konvenajn solvojn. Ni volonte informos vin pri rezultoj kaj niaj konkludoj kaj esperas, ke ĉio ĉi donos novajn impulsojn al la asocia kunvivado kaj via rilato al ĝi.

Vladimír Dvořák, nova ĈEA-prezidanto

**Demandaron sendu** al la komitatano Vratislav Hirš, Ruprechtov 117,  
683 04 Drnovice, tel. 517 332 339,  
ret-poŝto: vhirsx@ email.cz